

17 septembro 2022

UNESKO festis la Internacian Tagon de Paco



XX. Bakearen Nazioarteko Jardunaldia

Tolosan | 17.09.2022

Artikulu eta partekariak lehenbiziak dituen zerbituak atzeratu eta baliagarriak dira XX. edizioan.

Basquearen Nazioarteko Eguna (International Day of Peace) is a global event celebrating peace and non-violence. It is organized by UNESCO and is held annually on September 21st. The event includes various activities such as concerts, exhibitions, and seminars. In 2022, the event was held in Tolosa, Basque Country, and was the 20th edition of the event.

Basquearen Nazioarteko Eguna

kun grava kontribuo de Internacia Esperanto-Koruso

Okaze de la 20a Internacia Tago de Paco, Ne-Registaraj Organizo partneraj kun Unesco, kunlabore kun la guberniaj (eŭskaj) instancoj, organizis grandan eventon, la 17an de septembro 2022, en Toloso (Eŭskio, norda Hispanio). Jam antaŭ tri jaroj Esperanto estis elektita kiel unu el la kvar laborlingvoj de la evento, sed tiu ĉi devis okazi en 2020 kaj estis prokrastita al 2022 pro la pandemio. Tamen multaj el la organizoj, kiuj kontribuis al la evento per sendo de 3-mn filmeto de koruso kantanta por paco, estas ĉu esperantistaj ĉu kontaktitaj per nia informkampanjo.

Coros participantes



MEDELLÍN, COLOMBIA

Coro de Cámara Cecilia Espinosa

Fundada en 1984 por su actual directora, Cecilia Espinosa Arango, es una agrupación de voces mixtas que interpretan obras religiosas y profanas de diversos géneros y estilos, de nuevos creadores y de consagrados compositores de los siglos XX y XXI. Es un referente en Colombia, donde sus agrupaciones son coros-escuelas formando gran cantidad de músicos.



INTERNACIONAL

Internacia Esperanto-Koruso

Coro fundado en 1980 por cantantes de todos los continentes. Su objetivo es compartir el placer de cantar en esperanto internacional. El coro creó en 1987 por la necesidad del entendimiento internacional para lograr la paz. La actual directora es la maestra búlgara Zdravka Boytzhéva y cuenta con un repertorio internacional que abarca todas las épocas.



ESPAÑA

Coro de Jóvenes de Madrid

Es uno de los coros juveniles de referencia en España, que ha logrado la mayor proyección europea. Creado en 2014, bajo la dirección de Juan Pablo de Juan, está integrado por 80 componentes. En su palmarés cuenta con premios nacionales e internacionales, entre otros, el máximo galardón en el XXI Gran Premio Nacional de Canto Coral de julio de 2022.

La solenadon kunorganizis TOPIC, internacia centro de pupteatro, kiu famigas la urbeton Toloso per sia pupteatra muzeo, kaj la LigKomitato de NROj ĉe Unesko. La origina plano estis kunmeti kantojn por la paco el la tuta mondo, postulante, ke ĉiuj ĉi korusoj kantu ilin en la sama tago, en siaj respektivaj urboj, kantante krome komunan kanton "Zatoz" speciale verkitan de fama eŭska komponisto Josu Elberdin. Bedaŭrinde, la iniciatinto de tiu ĉi grandioza projekto, reprezentanto de UNIMA (internacia unio de pupteatroj) ĉe Unesko, grave malsaniĝis pro longa Kovim kelkajn monatojn antaŭ la atinginda celo, kaj ŝiaj posteuloj ne ricevis ĉiujn informojn kaj neglektis spektigi la filmon: pro nia lastminuta insisto, eblis vidi ĝin sur etaj televidiloj en la halo, post la fino de la matena kaj vespera programeroj, kiam ĉiuj jam foriris aŭ (vespere) sen sono.



pupteatra muzeo en Toloso (TOPIC)



projekciado de la filmo de tutmondaaja korusoj

Tiu ĉi 40 mn filmo kun packantoj el la tuta mondo aŭdigas ĉirkaŭ 1500 voĉojn, el kiuj 950 infanojn, kun 90 muzikistoj... Claude Yvans, kiu nome de sia NRO kolektis la filmetojn kaj muntis la filmon, estis impresita de la multaj kontribuoj de esperantistoj, kaj interalie de la eŭropa himno en Esperanto. La filmo estas ĉiukaze spektebla per Jutubo: <https://youtu.be/ZF4o-ZmOdgQ>.

Krom tiu ĉi filmo, estis planita surloka programo, kiu okazis preskaŭ kiel antaŭvidite. Estis invititaj ses profesiaj korusoj el preskaŭ ĉiuj kontinentoj: Japanio, Kenjo, Kolombio, Kroatio, Hispanio kaj Eŭskio, por posttagmeza kantado tra la urbo kaj vespera koncerto en teatro. Al tio aldoniĝis podia diskuto de junuloj, sabaton matene en alia teatro, pri "paco, arto kaj junularo", en kiu partoprenu po unu junulo el ĉiu koruso. Jam pli ol unu jaron antaŭ la evento, Zdravka Boytcheva, korsestrino de internacia koruso dum Universalaj Kongresoj, proponis partoprenon de internacia koruso kun membroj el plej multaj landoj kantantaj en Esperanto, sed la organizantoj longe hezitis ĉar tiu koruso ne estis konata kiel profesia koruso. Pro insisto de François Lo Jacomo kaj promeso, ke ni petos de la organizantoj neniun financon helpon, tiuj ĉi finfine akceptis en marto 2022, sed nur en julio ni ricevis sufiĉajn informojn por pretigi programon kaj definitivigi la liston de kantantoj.



François Lo Jacomo kaj Davide Grosso, prezidanto de la LigKomitato de NROj ĉe Unesko, antaŭ TOPIC-domo.

Fakte duono el la invititaj korusoj rezignis: venis nur la kolombia, la hispana el Madrido kaj la eŭska, tiel ke la ĉeesto de internacia koruso kiel kvara koruso konsiderinde pliriĉigis la programon. Nian partoprenon financis mecenatoj kaj subvencioj de UEA kaj Pangeo NRO – inĝenierado pri paco, la du plej gravaj organizoj partneraj de Unuiĝintaj Nacioj laborante por Esperanto.

Personas participantes en la mesa redonda



COLOMBIA
María Angélica Bueno Cipagauta

Psicóloga de la Pontificia Universidad Javeriana. Es experta en el desarrollo de estrategias de política pública en reconciliación, paz, justicia transicional y resolución de conflictos. Ha sido Coordinadora del Objetivo de convivencia de la Comisión para el



FRANCIA
Linda Le Nepveu

Graduada en Economía y Derecho Económico Internacional, ha ejercido como abogada legal en derecho laboral e investigadora de la jurisprudencia luxemburguesa, francesa y europea. Ha coordinado y organizado todos los eventos organizados en el marco del Congreso Mundial del Esperanto, celebrado en Montreal (Canadá).



ESPAÑA
Amanda Aguirre

Graduada en Relaciones Internacionales y Traducción y Comunicación Intercultural por la Universidad Europea de Madrid. Trabaja como traductora bilingüe especializada en relaciones internacionales. Ha trabajado, entre otros, para el Ministerio de Asuntos Exteriores y de Cooperación de España en la gestión de datos de las Organizaciones Internacionales.



Linda Le Nepveu reprezentas la Esperanto-koruson.

La ses partoprenintoj en la podia diskuto:

Nia reprezentanto en la podia diskuto estis Linda Le Nepveu, franc-bulgara esperantisto, filino de Zdravka Boytcheva. Prezertinte Esperanton kiel universalan lingvon, ŝi aldonis, ke muziko estas eĉ pli universala ol Esperanto, kaj akcentis ke por daŭripova paco plej gravas edukado kaj konsciigo, ke ĉiu el ni havas ion por diri.

gvidantino, franca kaj kolombia partoprenantoj en la podia diskuto



de maldekstre,
Amanda Aguirre (Hispanio),
Davide Grosso (Unesko),
Ainhoa Gomez (Eŭskio),
Eva Quiroga (prezentanto),
Linda Le Nepveu (Esperanto),
María Angélica Bueno Cipagauta (Kolombio).

En la podia debato partoprenis Davide Grosso, prezidanto de la LigKomitato de NROj ĉe Unesko kaj reprezentanto ĉe Unesko de Internacia Konsilio pri Muziko. Li interalie proponas aldonon de al la UN-celaro por daŭripova evoluigo de dekoka celo pri arto. La debato estis (kun samtempa interpretado) en la franca, hispana kaj eŭska, kaj ne angla. Per la retejo de la evento, <https://www.bakea.eus/>, eblas spekti la tutan duhoran debaton: <https://youtu.be/asQ3GTa1YG0>.

Nia koruso enhavis dudekon da kantantoj el dekduo da landoj (Hispanio, Francio, Svislando, Luksemburgo, Danlando, Estonio, Pollando, Rumanio, Bulgario, Usono, Kanado kaj Kostariko). Ili alvenis jaŭdon, provkantis dum la tuta vendredo kaj sabaton matene kun la aliaj korusoj. Ĉemizoj kaj partituroj kun emblemoj desegnitaj de Rafael estis menditaj lastminute, kaj tamen alvenis ĝustatempe. Verdajn ĉapelojn pruntedonis Esperanto-Francilio.

Ekde la 16a 30, post lasta provkantado, komenciĝis paŝado kaj ekstera kantado sur tri famaj placoj de la urbo. Male je la unua planita programo, sur ĉiu placo kantis ĉiuj korusoj. La nia preparis kvin kantojn: sur la unua placo, *Donu la ni pacon* kaj *Frate marŝas* (afrika kanto), sur la dua, *Kantu, ni kunkantu* kaj *Bruas kaj muĝas Dnepro vasta* (ukraina kanto) kaj sur la tria, antaŭ la sidejo de TOPIC, *La espero*.



Lasta provkantado antaŭ la paŝado



Davide Grosso (Unesko) kaj Estitxu Zaldua (estrino de TOPIC) dum la paŝado inter la placoj.



La unua placo, ĝardeno de de la memoro. Nia koruso kantis maldekstre de la ruinoj.



Grandaj ŝildoj sur la muro anoncis la eventon.



kantado
sur la unua
placo:
Ĝardeno
de la
memoro

ukraina kanto
sur la
dua placo
(placo Berria)



:



la espero,
sur la tria
placo
(Euskal
Herria),
antaŭ la
sidejo de
TOPIC.



Sur tiu sama placo Euskal Herria, antaŭ artaĵo speciale konstruita por ĉi tiu evento, ĉiuj korusoj kune kantis la komunan kanton "Zatoz" antaŭ ties komponisto kaj akompanataj per piano de blinda handikapita junulo.

Kaj ĉiuj korusoj kune kun oficialuloj pozis por komuna foto. Michel Thouzeau, iniciatinto de la tuta evento, ĉeestis la tutan programon kaj prezentis, enkonduke al la matena podia debato, la historion de tiuj internaciaj tagoj de paco.



Vespere, je la 20a, okazis koncerto kun ĉiuj korusoj en teatro Leidor. La tuta koncerto, preskaŭ duhora, estas spektebla per Jutubo: <https://youtu.be/7TXxnrMTj8>. Jen la kolombia koruso:



Tre granda estis la profesia hispana koruso el Madrido. Ties estro ŝatis nian esperanto-koruson kaj eĉ deziras mem kanti en Esperanto.



La eŭska koruso kantis en tradiciaj eŭskaj kostumoj.

Nia internacia Esperanto-koruso prezentis kvin kantojn:

- *Kantu, ni kunkantu*
- *Jen mia preĝo*
(muziko de Jean Sibelius)
- *Vesperiĝo*
- *Bruas kaj muĝas Dnepro vasta* (el Ukrainio)
- *La espero*



Zdravka Boytcheva, korusestrino, verde vestita, fine de la kantado

Fine, ĉiuj korusoj kune kantis la komunan kanton "Zatoz", gvidataj de ties komponisto, kaj la juna handicapulo pianludis plurajn minutojn. Ĉiuj korsestroj ricevis florojn kiel dankon, kaj ni ĉiuj kune vespermanĝis. Improvize, la hispanaj korusoj aldonis kantojn al tiu ĉi simpatia etoso.

Pliajn bildojn kaj ligilojn al la spektakloj vi trovos en la retejo de la evento:

<https://www.bakea.eus/>,



Josu Elberdin, post komuna kantado de la kanto "Zatoz", kiun li komponis speciale por tiu ĉi evento.



Fina pianludado...

... kaj disdono de floroj al la korsestroj



improvizita kantado de la hispanaj korusoj fine de la komuna vespermanĝo.

Ĉe tablo: Davide Grosso (Unesko) kaj Estitxu Zaldua (TOPIC)